Johann Wolfgang von Goethe,

La bela lando

tradukita de Karl Vanselow

Ĉu konas vi la landon kun la flor'
De citronujoj kaj oranĝa or'?
Bluegas la ĉiel' kun milda vent',
La mirt', la laŭro staras en silent'.
Ĉu vi ĝin konas? For al ĝi,
Al tiu revo-land' sopiras mi.

Ĉu konas vi la domon sen kompar'?
Kolonoj brilas, brilas la ĉambrar',
Marmoraj dioj alrigardas nin
Demande: Kio malgajigas vin?
Ĉu vi ĝin konas? For al ĝi,
Al tiu revo-land' sopiras mi.

Ĉu konas vi la monton en nebul'?
La vojon serĉas tra nubar' la mul',
De la rokegoj tondras la torent',
Kaverne loĝas praa drako-gent'.
Ĉu vi ĝin konas? For al ĝi,
Al tiu revo-land' sopiras mi.

Traduko de la Germana poemo "Mignon" de Johann Wolfgang von Goethe *(∗1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* Karl Vanselow *(∗1877-03-20 – †1959-12-28).*

Arg-533-1064 (2010-04-05 14:20:53)

Tiu ĉi esperantigo troviĝas en la poem-libreto "Nia Lingvo Esperanto, Elektita poezio por deklamo kaj kanto, Dua kajero de la unua serio, Dua Ardesia-eldono", verkita kaj eldonita de Karl Vanselow, sur la paĝo 60. Sub la teksto eatas tie indikita: (Laŭ "Mignon" de Goethe. Verkita nur por deklamo). - Pri la aŭtoro Karl Vanselow legeblas informoj en `http://eo.wikipedia.org/wiki/Karl_Vanselow`.